# La rabobesto *Homo sapiens* kaj bestoprotektado

*Rüdiger* SACHS

Kiel ajn la homo opinias sin altanima, honesta, humana – li estas rabobesto. Eĉ pli: li ne plu ĉasas la predobestojn (aŭ nur de tempo al tempo, kaj tiam por sia propra plezuro), sed li "tenas" (en la senco de enŝlosi) ilin en kaĝoj aŭ kaptitejoj. Li ekspluatas ilin, gajnas profiton el ili, mortigas ilin en okazo de bezono.

La rabobesta agado "fari predon" estas metata rande de la konscio kaj la socia vivo. Kiu manĝas bifstekon ne plu pripensas, ke iu buĉis por li parhufulon; kiu kuiras sian matenmanĝan ovon, ke por li suferas birdoj en ĉenstablaj kaptitejoj; kiu surpiedigas ledajn ŝuojn aŭ vestas sin per leda jako, ke por li necesis senhaŭtigi bovon aŭ ŝafon.

La hodiaŭa urbohomo ne plu sentas ion pri la origina rabeca bazo de sia vivo. Li fakte ne plu volas scii pri tio. Kiam li pensas pri bestotenado, li havas antaŭ siaj okuloj la reklamŝildojn de kontentaj bovoj sur plastaj lakto-skatoloj. Aŭ li memoras infantempajn rakontojn kaj bildojn pri verda paŝtejo kun infanetoj ludantaj kun ŝafidoj, porkidoj, kortbirdidoj kaj fiera virkoko sur sterk-amaso, vek-kokerikanta frumatene la kampulojn.

Tiuj pacaj bildoj, kiuj en la hodiaŭa tempo akiris ĝeneralan akcepton, ne plu havas ion komunan kun la bestotenado disvastiĝinta en la pasinta duonjarcento. La bestoj, kiuj liveras nuntempe niajn ĉiutagajn nutraĵojn, preskaŭ neniam vidas iun ajn homon krom la brediston kaj la buĉiston – eble okaze la veterinaron. El kampara bestotenado fariĝis ekonomika branĉo regata de la fera leĝo de ĉia ekonomia mastrumado – per enmeto de plej malmulte da kapitalo kaj laborforto akiri plej altan profiton. La besto estas nura objekto. Objekto de valoro kaj monogajno. En tiu produktadoproceso la malsovaĝigitaj bestoj, tiam kunvivuloj de la homo, fariĝis agrikulturaj utiligbestoj aŭ profitigaj fabrikbestoj – malsaniĝemaj sed nemalhaveblaj robotoj. Ili havas la



nuran taskon plejeble malaltakoste kaj senvarte transformi plantan furaĝon en animalan proteinon.

Tia ŝanĝiĝo de la iama bildo pri kamparaj bienoj el infan- imago en agrofabrikojn (kaj la tie vivantaj animaloj en bestomaŝinojn) pligrandigas la distancon de la homa konsumanto kontraŭ la originon de lia nutraĵo. La porcie tranĉita kaj polietilene enpakita nutraĵo, kiun li trovas en la sterilaj vitrokestoj de la superbazara neonlumo, perdis ĉiun rilaton kun la naturo.

Fremda al siaj originaj vivokondiĉoj, la urbanigita homo sin ofte fordonas al bestoamo. Elkore li amas ilin: la hundojn kiujn li incestbredis al groteskaj karikaturaĵoj, la katojn kiujn li kredas kapablaj al vivo ĉiama interne de etaĝ-loĝejo, la birdojn kondamnitajn al vivolonga izoliteco en ornamdekoraciita birdokaĝo. Ne venas al li la ideo, ke la zorga inklino, nomata amo, por lia besta objekto povas esti tute alia ol feliĉiga donaco sed nura posed-pretendo. Amo ne estas io malegoisma. Kontraŭe, ĝi estas la plej egoista pasio al kiu la homo estas kapabla – kaj nur se la amo estas reciprokata la egoisma kerno fariĝas nevidebla.

La soleca oldulino, kiu ne plu havas iun ajn homon por kiu ŝi povas zorgi kaj sian tutan amokapablon aplikas al kanario, ekteruriĝas kiam ŝi aŭdas, ke la birdoj, kies ovojn ŝi aĉetas en la bazaro, estas tenataj en malvastaj kaĝoj. Ke ŝia karulo ne estimas la birdokaĝon kiel la plej belan lokon en la mondo, ŝi tute ne pripensas – eĉ ne tiam, kiam tiu karulo profitas el okaza malatento kaj forflugas en la liberecon. Ŝi ekkoleras pri la barbara spektaklo de taŭrobatalo sen pripensi, ke la kastrita bovomasklo, el kiu estas farita la spica gulaŝo, multe pli maldigne mortas en buĉejo. Neniun hejmbeston ni amas tiel kiel ni amas la germanan ŝafhundon – ĉar ĝi ja estas nia plej senkondiĉa soldato, neniun alian beston oni povas tiel dresi kiel ĝin por sindone riski sian vivon por niaj – ne siaj – interesoj, eĉ ĝis murdo.

Ni, la homoj, estas ekspluatemaj eĉ tie, kie ni kredas nin bonanimaj kaj plenaj de pura amo. La imago, kiun ni havas de nia rilato al la bestomondo, estas misformita pro sentimentaleco kaj malrekono. Kaj ni ne volas respondeci kaj konsenti pri tio, kio en nia nomo kaj sub nia komisio kaŭzas aflikton kaj suferon al bestoj.

La homo malsovaĝigis al si kelkajn bestospeciojn kiel akompanantojn, kunvivantojn kaj eĉ amikojn sur sia vojo de praaj al civilizaj tempoj. La homo celkonscie bredis ilin – do, li genetike alikonstruis ilin tra generacioj laŭ sia bezono. La hejmigitaj bestoj vivas en la

nuna nombro kaj formo nur tiel, kiel kaj kiom longe ili estas utilaj por la homo. La celo de bestobredado ne estas bestoama, ankaŭ ne bestoamika. La besto estas flegata kaj nutrata por esti prirabata, senfeligata kaj manĝata.

Bestoprotektado estas tute relativa afero: fine ja la homo "protektas" siajn predojn tiom multe – aŭ tiom malmulte – kiom tion faras ĉiu alia rabobestospecio: nome li protektas ilin por si mem kontraŭ aliuloj. La demando restas nur, kiom severe li ilin traktas antaŭ ol buĉi ilin. Ni ne preteratentu la avantaĝojn kaj plibonigojn rilate al la transporta zorgo kaj vartado de buĉbovoj, la kaĝotenado de ovoproduktaj kokinoj kaj aliaj industriaj bestotenad-teĥnikoj. Ni ankaŭ ne forgesu aliajn ekologiajn ekkonojn, kiuj intertempe politike venkis spacon.

Sed ni ne rigardu kaj akceptu tiajn plibonigojn kiel favoraĵojn de la flanko de la leĝodonaj ministerioj aŭ gvidaj registaroj. La politika kaj industria opinio ofte malsamas kun tio, kion rimarkas la observema naturprotektanto.

Ŝajne agas kelkfoje kvietiga aparato de politikaj instancoj kontraŭ plendoj de bestoprotektantoj. Estas tempo evoluigi pli bonan komprenon inter ofte nepacigeblaj kaj senkompromisaj frontoj. Ni serĉu veran kaj sinceran vojon cele al ambaŭflanka interkonsento pri konscia bestoprotektado.

La bestoj estas parto de nia Tero, same vundigeblaj kiel la grundo. La homo ne estas mastro de ĉio kio vivas – li same estas parto de la Tero.

**Adreso de la aŭtoro**

*Prof. Dr. Rüdiger SACHS*
*Vor dem Brückentor 3*
*DE – 37269 Eschwege*
Germanio

<IsaeSachs@aol.com>

**Priaŭtora informo**

La aŭtoro estas bestkuracisto kaj profesoriĝis en parazitologio. Li multajn jarojn laboris en Afriko kaj speciale okupiĝis pri protektado de sovaĝaj bestoj en tropiklandaj Naciaj Parkoj.



# Ĉu la realista starpunkto ekzistis ekde la komenco en la genera gramatiko de *Chomsky*?

*Hiroshi NAGATA*

**Resumo**

*Chomsky* (1975) asertis, ke en LSLT (*The logical structure of linguistic theory,* t.e. la logika strukturo de lingvistika teorio) la realista starpunkto estas plene kaj senkondiĉe akceptita. Tiu ĉi artikolo ĵetis dubon antaŭ lia aserto, esplorante tiun ĉi verkon kaj aliajn publikigitajn en plej fruaj jaroj. Ĝi konkludis, ke en la verko ne ekzistis la realista starpunkto aŭtentika aŭ mensa aŭ fizika, sed ekzistis anstataŭe nur kvazaŭa mensa realismo en la formo de lingva intuicio. Tiu ĉi lingva intuicio ne estis identa kun iuj aŭ aliaj aspektoj de la teorio, sekve, kontraŭe al lia aserto, nesufiĉa por kontentigi aŭtentikan realismon.

## Enkonduko

La genera gramatiko de *Chomsky* ("Ĉomsko" en la sekva teksto konforme al Esperanta ortografio, escepte dum referencado) disvolviĝis tiugrade, ke oni karakterizas ĝin kadre de biolingvistiko (angle *biolinguistics*, ekz. *Jenkins* 2000; *Anderson & Lightfoot* 2002) [(1)] kaj ke "la studo de biologie necesaj trajtoj de lingvo konsistigas parton de natura scienco" (*Chomsky* 1980, p. 29).[(2)] Ĉomsko, laŭ *Jenkins* (2002, p. 3), mem priskribis en 1968 lingvistikon kiel "teorian biologion." Ne necesas diri, ke tiuj ĉi esploristoj, inkluzive de Ĉomkso, ne esploras la biologiajn aspektojn de lingvo, sed nur ties strukturajn aspektojn pere de formalismaj analizoj. Tial oni neniel povas trovi en iliaj studoj iom da eroj, kiuj sugestas tian biologion kian eĉ nefakuloj unuavide ekvidas en biologiaj verkoj. Ili tamen insistas, ke iliaj analizoj traktas ne abstraktajn teoriajn konstruojn (angle, *theoretical constructs*) sed ĝuste realajn objektojn (vd. *Chomsky* 1983, 1987). Laŭ tiu ĉi realista starpunkto, ilia lingva teorio formalisma rilate, ekzemple, al universala gramatiko efektive indikas ne nur realajn statojn de